

LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)

Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.

Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato

Jarkolekto 5, n-ro 2 (26): julio-aŭgusto 2012

Antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas ekde la 13-a.

Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,

B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47

Retadreso: pieter-jan.doumen@telenet.be

Redaktore...

Karaj Gelegantoj,

Jus komenciĝis la plej bela sezono de la jaro: somero. Aŭ kio devus esti la plej bela sezono ĉe ni, sed ofte kaj multe pluvas, fulmotondras, kaŭzante troon da akvo kaj kirloventojn, kiuj elŝiris aŭ rompas arbojn kaj suĉas tegelojn kaj eĉ tutajn tegmentojn de domoj.

Sed kiel diris D-ro Zamenhof: 'Ĉiu sezono kun sia bono'. Por multaj inter ni nun komenciĝas la longe atendata periodo de la ferioj, kiujn multaj belgoj pasigas en nia lando. La marbordo kaj Ardenoj estas la plej ŝatataj ferilokoj en Belgio en tiu ĉi momento. Efiko de la ekonomia kaj financa krizo en la mondo ?

Sendu al ni foton de viaj ferioj kun salutoj por la legantoj de nia revuo. Ankaŭ mi ferios kun mia edzino ĉe la bordo de la Norda Maro en Nieuwpoort. Kaj mi donos la bonan ekzemplon, publikigante foton de ni ambaŭ.

Intertempe mi deziras al vi agrablajn feriojn enlande aŭ eksterlande, hejme aŭ aliloke, kaj ankaŭ agrablan legadon de 'La Ponto'!

Pieter Jan Doumen

Dua Libro de l' Lingvo Internacia (7) *(Tweede Boek van de Internationale Taal)*(7)

Sed nun restas unu ŝajne tre grava demando: se mi skribas al iu en la lingvo internacia, kaj mi devas krei kelkajn vortojn mem, sed mi volas havi la certon, ke la adresito tute bone, vere kaj klare komprenas la vortojn, kiujn mi kreis, kion mi devas tiam fari? La respondo estas simpla: fari tion saman, kio estas farata ĉe la uzado de ĉia alia lingvo, se ia por ni necesa vorto en tiu lingvo aŭ tute ankoraŭ ne ekzistas aŭ ne estas ankoraŭ de ĉiuj egale uzata aŭ konata, t.e. apud la vorto nove kreita meti

en kuneteniloj (...) la tradukon de tiu vorto en ia alia lingvo, en kiu tiu vorto jam ekzistas.

Kiun lingvon vi uzos por tiu celo, estas afero tute egala, se vi nur pensas, ke tiu lingvo estas komprenebla por via adresito, aŭ ke li havas sub la mano aŭ facile povas havi vortaron de tiu lingvo. Sed estus dezirate, ke ĉiuj amikoj de la lingvo internacia uzu en tiaj okazoj 'unu' lingvon, kaj por tio mi proponas la lingvon francan, ĉar tiu ĉi lingvo en nia tempo en multaj sferoj ankoraŭ havas la rolon de lingvo internacia. Sed tute ne estas postulata, ke vi aŭ via adresito sciu la lingvon francan, ĉar la vorto devas esti elskribata el la franca vortaro sen ia ŝanĝo, en tiu formo en kiu ĝi estas trovata en la vortaro; estas nur necese, ke la skribanto kaj la ricevanto havu sub la mano francan vortaron (se ili ne pli volas uzi alian lingvon).



La lasta foto de D-ro Zamenhof (1917)


Multaj kredeble estos malkontentaj, ke mi ne volas eldoni persone plenan aŭtoritatan vortaron, kiun ĉiuj devus obei. La amaso amas, ke oni donu al ĝi leĝojn, ke oni donu al ĝi ne bonan, sed jam tute pretan vortaron, kaj la vojon, kiun mi proponas, multaj nomos tro malrapida. Se mi ne eldonas mem vortarojn pli plenajn, sed lasas ilian kreadon al la publiko, mi ĝin faras ne pro maldiligento: sufiĉe plena vortaro jam estas preta ĉe mi, kaj mi povus eldoni ĝin eĉ tuj, kaj se ĝi eĉ ne estus preta, la leganto komprenos, ke ĝi estas tute ne mal-facila por mi krei ĉiutage certan nombron da

vortoj kaj eldonadi paŝo post paŝo vortarojn ĉiam pli plenajn. Por mi persone estus kompreneble multe pli oportuna teni la sorton de l' lingvo internacia en miaj manoj. Tial mi esperas, ke la leganto komprenos, ke, kreinte la fundamenton de l' lingvo, mi nun deprenas de mi la tutan aŭtoritaton nur tial, ke mi profunde kredas, ke tion postulas la interesoj de l' afero. La tempo, mi esperas, montros, ke mi ne eraris. Sed se la estonteco eĉ montros, ke mi eraris kaj ke plena vortaro devas esti kreata de 'unu' persono, la leganto ne forgesu, ke mi ja povas ĝin fari ankaŭ poste! Sed mi faros ĝin nur tiam, se la tempo montros, ke ĝi estas efektive 'necesa'. Nun mi laborados, mi skribados verkojn, mi kreados vortojn, sed ĉion kiel privata amiko de l' lingvo internacia, kaj ĉiu alia povas ĝin fari kun la egala kompetenteco.

5) Je la demando, kiam mi eldonos vortarojn returnitajn (nacia-internaciajn), kiam mi eldonos mian broŝuron en ĉiuj aliaj lingvoj, gazetojn etc., mi jam nun volas respondi; ĉar konante nun la lingvon internacian ne malpli ol mi mem, kaj estante nun egale morala kaj materiala mastro de la lingvo kiel mi mem, ĉiu povas nun mem eldoni ĉiajn necesajn verkojn, ne atendante ĝis mi ĝin faros. Mi faros, kion mi povos, kaj ĉiu alia amiko de l' lingvo ankaŭ faru, kion li povos: mi mem ne povas eldoni eĉ la centan parton de tio, kio estas bezonata.

6) Multaj petas, ke mi komencu eldonadi la adresarojn de la "promesintoj", por ke la amikoj de l' lingvo internacia sciu unu pri la alia kaj povu korespondi inter si. Tiujn adresojn mi kredeble efektive komencos eldonadi, sed nur tiam, kiam mi vidos, ke la homoj efektive komprenis la gravecon de l' promesoj kaj prenas la aferon sufiĉe serioze. Sed nun estas bedaŭrinde ankoraŭ multaj, kiuj, vive laborante por la afero kaj tute bone korespondante en la lingvo internacia, ne sendis ankoraŭ ilian "promeson".


7) Multaj min demandas, per kio ili povas esti utilaj al la afero de l' lingvo internacia, kiel ili devas labori kaj kiel oni povas la plej certe progresigi la aferon. Mia respondo nun devas esti: ĉiu laboru tiel, kiel li trovos la plej bone, ĉar la sorto de l' afero estas nun egale en la manoj de ni ĉiuj. Celon ni ĉiuj havas unu kaj klaran: ke la nombro de l' amikoj de l' lingvo internacia, la nombro de l' personoj uzantaj



tiun lingvon kaj laborantaj por ĝi, konstante kresku, kaj ke la lingvo mem ĉiam pli riĉiĝu. Por tio ni ne bezonas kondukanton; ĉia persono, ĉia rondeto, ĉia societo laboru laŭ sia bontrovo, en sia sfero kaj laŭ siaj fortoj, kaj malgraŭ la disjetiteco de l' laboro (se ĝi nur estos ĉie sufiĉe energia) post la plej mallonga tempo ni vidos, ke nia komuna celo estas atingita, ke la lingvo internacia fortiĝis kaj estas uzata de la tuta mondo. Tie ĉi mi nur uzos la bonan okazon kaj esprimos per kelkaj vortoj mian personan penson pri tio, kiel ni devas agadi:

a) Antaŭ ĉio (kaj tio estas la plej grava) ni devas labori diligente kaj ne malvarmiĝante por la afero kaj tute ne zorgante pri tio, kion diras aŭ faras aliaj. Estas multaj, kiuj komprenante bone la utilecon de l' afero, alfalas al ĝi en la komenco tre varmege, certe kredante, ke post kelkaj monatoj la tuta mondo jam estos plena de la lingvo internacia; sed kiam post kelka tempo ili vidis, ke la mondo estas ankoraŭ trankvila, ke la plej granda parto de l' mondo eĉ ankoraŭ ne scias pri la afero, ke la gazetoj ne alportas ĉiutage sensaciajn novaĵojn pri la irado de l' afero, ili tute malvarmiĝis por l' afero. De la efemera laboro de tiaj amikoj la afero ne sole nenion gajnas, sed kontraŭe, ĝi nur perdas. Sed 'efektivaj' amikoj de l' afero, ne rigardas, ĉu la afero jam faris multon da bruo kaj ĉu ĝi estas jam sufiĉe 'en modo'; profunde kredante, ke la afero estas utila kaj havas estontecon, ili laboras senbrue, sed diligente kaj konstante, ĉiu en sia urbo, en sia lando kaj laŭ siaj fortoj, kaj danke la laboron de tiuj ĉi amikoj mi esperas, ke l' afero baldaŭ kaj sen bruo vastiĝos en la tuta mondo.

(D-ro L.L. Zamenhof, daŭrigota)



Novajoj el Esperantolando

(Nieuws uit Esperantoland)

Meksiko: *Utopio en 4 movadoj* –

Ĉefurbe de la lando dum la pasintaj 17-a kaj 18-a de februaro en la *Centro Nacional de las Artes* Sam Green kaj Dave Cerf prezentis sian dokumentan filmon nomatan «Utopio en 4 movadoj» kadre de la turneo de dokumentaj filmoj « Ambulante 2012 ».

Por enkonduki la filmon Rebecca Solnit skribis : « La utopio ĉiam implikiĝis iel en la komuna agado... . Tiuj kiuj havis esperon kaj radikalajn viziojn, ne volis nur solvi la proprajn problemojn, ili volis fari ion por ĉiuj ni, por ĉiuj personoj ĉirkaŭ la mondo kaj por tiuj kiuj vivos en la estonteco... »

Tiel la unua movado de la utopio estas la Internacia Lingvo Esperanto. Green prezentis parton de ĝia historio ekde la kreado de la lingvo, kelkajn malfacilaĵojn en la vivo de Esperanto, internaciajn kongreserojn, esperantoparolantojn de diversaj landoj ktp. Sed la plej interesa parto estis la intervjuoj de aktivuloj, kiuj parolis diversmaniere pri la reala efiko de la lingvo, ne forgesante ĝian socian kaj pacan rolon : « ... en tia kongreso videblas io unika : homoj, eĉ el malamikaj landoj, interparolas normale, ... ĉiuj komprenas, ke la homoj samas ĉie en la mondo... ».

La aliaj movadoj prezentas : la 2-a la evoluon, la 3-a la kreadon de komercaj centroj kiel spacoj de socia homa vivo, kaj la 4-a la laboron de junaj kuracistoj, kiuj provas rekuperi la homajn restaĵojn de militoj. Je la fino la rakontisto substrekas la gravecon kompreni, ke la mondo plenas de utopioj, kiuj helpas la disvolvigon de la homaro.

Dum ambaŭ tagoj la Meksika Esperanto-Federacio partoprenis la eventojn, kiujn spektis entute ĉirkaŭ 800 homoj. En la tempo por komentoj kaj demandoj Martin Schäfer kaj Mallely Martínez publike invitis la partoprenantojn esti parto de nia movado kaj ankaŭ dankis al Green, Cerf kaj la muzikgrupo « The Quavers », al kiuj nome de MEF ili donacis muzikdiskon kaj libron en Esperanto. Ŝajne tiu ago havis grandan efikon, ĉar poste ĉiuj forte aplaudis. (*Mallely Martínez, prezidantino de la Meksika Esperanto-Federacio*)

Ĉinio: *Hajnano, Esperanto-Insulo II* –

Post la sukceso de la Esperanto-Insulo, kiu arigis 126 studentojn kaj profesorojn el 26 landoj sur la ĉina insulo Hajnano de la 11-a de januaro ĝis la 12-a de februaro 2012, la Esperanto-Insulo II okazos samperiole en januaro-februaro 2013 kun aldona sperto pri organizado.

La programo de la kursaro estos trinivela :

- 1) Tre intensiva kurso por komencantoj kaj nefluaj parolantoj dum 8 horoj tage ;
- 2) Kurso por Esperantoparolantoj kiuj deziras lerni la instruadon de la lingvo en Ĉinio (profesiigo de la Esperanto-instruado) ;
- 3) Universitato de Esperanto : kursoj sub gvido de universitataj Esperantoparolantoj ; filmado de la kursoj ebligas tutmondan interretan disponigon de la kursoj. (*Henri Masson, Francio*)

Interreto: *Esperanto bezonas tradukistojn* –

TED (*Technology Entertainment Design*, en Esperanto: Teknologio, Amuzo, Fasonado), kies celo estas la disvastigo de ideoj, ekzistas en multaj lingvoj, inkluzive de Esperanto, sed nur subtitole. Tio signifas, ke per TED nur anglalingvanoj tuj plene profitas de la enhavo de videoj, dum alilingvanoj povas apenaŭ nur legi la subtekstojn.

La teamo kiu tradukas prelegojn el la angla en Esperanton, konsistas el 15 personoj el Usono, Anglio, Kanado, Aŭstralio, Brazilo, Ĉinio, Belgio, Nederlando, Germanio, Italio kaj Hispanio. Ĝis nun 45 prelegoj havas subtekstojn en Esperanto.

La nomo **Tatoeba** devenas laŭ Vikipedio de la japana kaj signifas 'ekzemplon'. Ĝi estas kunlabora projekto celanta la kolektadon de multaj frazoj tradukitaj el diversaj lingvoj. Ĉe Tatoeba Esperanto atingis altan rangon. Ĝi estas la tria inter 105 lingvoj per 146.075 frazoj post la angla per 228.831 frazoj kaj la japana per 163.976 frazoj.

La 20-an de aprilo **Wikipedio** havis 163.348 artikolojn kaj troviĝas sur la 27-a loko inter 285 lingvoj. Ĝi momente perdis unu rangon profite al la dana. Eblas uzi kaj adapti, post lingva kontrolo, la artikolojn de la anglalingva versio de *Wikipedia* (baldaŭ 4 milionoj da artikoloj), kiu estas la plej malnova cifereca biblioteko. La plej multaj el ĝiaj verkoj estas kompletaj tekstoj de nekopirajtitaj libroj.

(*Henri Masson, Francio*)

Svedio : *Datumbazo de esperantaj artistoj* –

La Esperanta Artista Datumbazo, kreita en 2005 de Eurokka kaj [E@I](#) sub la gvido de David Emil Wickström, ne plu funkciis ekde de 2008 pro manko de kunlaborantoj.

En majo 2012 estis lanĉita la reaktualigo, la ĝisdatigo kaj la restrukturado de tiu Artista Datumbazo fare de nova kaj freŝa teamo (kunlaboro inter Eurokka, UEA, TEJO, Muzaiko kaj E@I). La laboro estas giganta kaj malnova kun novaj artaj kampoj aldone al muziko, kiel teatro, literaturo, kino, video ktp. La renovigo daŭros la tutan someron, post kio la Artista Datumbazo remalfermiĝos kun novaj vestoj kaj funkcioj.

La Datumbazo plifaciligos la kontaktojn por trovi artistojn, por organizi koncertojn aŭ aliajn programerojn en Esperanto-renkontiĝoj, aŭ aranĝi Esperanto-festivalojn, sed ĝi utilis ankaŭ por artistoj kiuj organizos turneon, aŭ por trovi koncertojn, produktejojn, eldonejojn, adaptistojn, gazetojn por recenzoj, radiojn, praktikajn konsilojn, modelojn, lingvan terminologion, teknikaĵojn, ktp.

Se vi havas kelkajn liberajn horojn semajne aŭ monate kaj emas helpi vivteni la projekton, venu : estas tre bonvena via helpo !

Artistoj, kiuj ankoraŭ ne anoncis sin por ĝisdatigo aŭ eniro en la Datumbazon, bonvolu kiel eble plej baldaŭ kontakti Flo ĉe Eurokka aŭ Vilnilkosmo : floreal@vinilkosmo.com .

(*Ret-info, Eventoj, Hungario*)

Germanio: *Feliĉan naskiĝtagon, Esperanto !* –

La aŭtomarko MINI deziras feliĉan naskiĝtagon al Esperanto okaze de la 125-a datreveno de ties surmondiĝo. La prestiĝa aŭto-entrepreno BMW eldonis gazetaran komunikon pri tio krom en la germana ankaŭ en Esperanto: <https://www.press.bmwgroup.com/pressclub/pdf/download.htxtId=154803&textAttachmentId=189700> en elŝutebla pdf-formato.

Ekzistas interesa foto ankaŭ en la plurlingva gazetara komunikado de la fabriko BMW !

... Pro tio MINI deziras en la plej esperanta Esperanto « Feliĉan naskiĝtagon » kaj ĉion bonan por la venontaj 125 jaroj!...

(*Ret-info, Eventoj, Hungario*)

Nia vasta, bunta mondo

Io pri nia sunsistemo

(*Iets over ons zonnestelsel*)

Multaj homoj ne komprenas, kio kaŭzas la alternadon de la sezonoj, kial ni havas someron, aŭtunon, vintron aŭ printempon.

La akompananta desegnaĵo, kiu prezentas nian sunsistemon, bone klarigas, kial ni havas kvar sezonojn. Oni vidas la sunon en sunfloro kaj flanke de ĝi la tero, kiu estas duone prilumita de la suno kaj duone en mallumo.

La diametro de la tero ĉe la ekvatoro estas preskaŭ 13.000 km, tiu de la suno estas mezume 1.400.000 km ! Se oni prezentas la sunon per globo kun unumetra diametro, la diametro de la tero estas malpli ol unu centimetro ! La distanco de la tero ĝis la suno estas mezume preskaŭ 150.000.000 km. La desegnaĵo do tute ne redonas la realajn proporciojn.



La linioj sur la terglobo kompreneble estas fikciaj kaj ne estas horizontalaj, sed oblikvaj vidalvide de la suno. La kaŭzo de tio estas, ke la ter-akso – la du streketoj sur la norda kaj suda polusoj – , ĉirkaŭ kiun turniĝas la tero, ne estas vertikala, sed oblikva.

En la mezo oni vidas la ekvatoron, kun super ĝi la tropiko de Kancero, kaj sub ĝi la tropiko de Kaprikorno. Tute supre oni vidas la nordpolusan cirkon kaj tute sube oni vidas la sudpolusan cirkon.

La desegnaĵo prezentas la teron en la 21-a de junio, la plej longa tago en la nordo duonsfero. Precize je la 1h09, okcidenteŭropa tempo, la plej mallonga sunradio (nome tiu kiu sekvas la linion inter la centro de la suno kaj tiu de la tero) atingas la plej altan punkton en la norda duonsfero, tra kiu oni desegnas la tropikon de

**BOUW
EXPO
TEGELEXPO
MIX-BETON
BOUWMATERIALEN**

DE LAAGSTE PRIJS DE HOOGSTE KWALITEIT,
EN ONZE EXTRA SERVICE ZIJN ONZE KENMERKEN!

PAESEN

EEN ZAAK VAN VERTROUWEN !

TEGELEXPO ☎ 011 66 55 54
BOUWEXPO ☎ 011 66 55 50

Kancero. La tuta norda poluso estas prilumata de la suno, kie la suno ne subiras. En Peterburgo (Rusio) estas nun tiel hele, ke oni povas legi la gazeton nokte sur la strato sen ekstra prilumado – estas la periodo de la ‘blankaj noktoj’, kiel diras la rusoj. Ankaŭ ĉe ni en Belgio la noktoj ne estas tute malhelaj ekde duonmajo ĝis duonjulio, tial ke la suno troviĝas nur iom sub la horizonto. La nordpolusan cirklon oni desegnas tie, kie komenciĝas la mallumo. Dume la suda poluso estas tuta en mallumo tage kaj nokte.

La ter-akso ĉiam troviĝas en la sama pozicio. En vintro la tero troviĝas tute ĉe la alia flanko de suno, tiel ke la dekstra duona parto de la tero estas prilumata de la suno, kaj la plej mallonga sunradio atingas la plej suban punkton sub la ekvatoro je la 21-a de decembro, la plej mallonga tago en la nordo duonsfero. Tra tiu punkto oni desegnas la tropikon de Kaprikorno. La 21-an de marto kaj la 21-an de septembro la plej mallonga sunradio precize trafas la ekvatoron, kaj tago kaj nokto estas ĉie egale longaj. Tiel okazas, ke en la suda duonsfero nun estas vintro, kaj ke, dum ĉe ni estas aŭtuno, en la suda hemisfero estas printempo.

Tiel ŝajnas, kvazaŭ la suno malrapide sed konstante vojaĝus supren kaj malsupren inter la du tropikoj, kiu estas optika iluzio, ĉar tion kaŭzas la oblikva pozicio de la ter-akso.

Post la 21-a de junio la suno ŝajne kurbiĝas suden, kio daŭras ses tagojn, kaj tion oni nomas la norda solstico (sunhalto). La samo okazas post la 21-a de decembro, kiam la suno dum ses tagoj denove kurbiĝas norden – la suda solstico –, per kiu varmo denove kreskas en la norda duonsfero kaj la tagoj denove plilongiĝas.

Ankaŭ la zonoj Von Allen ludas gravan rolon en la temperaturo de la tero. Tiuj zonoj estis nur malkovritaj de la spacveturado, sed jam estis antaŭdiritaj de la rusdevena usona sciencisto Velikovky. Ili foriras en la formo de V de la norda poluso kaj alvenas en formo de V sur la suda poluso post gigantega kurbiĝo tra la spaco, tiel ke la tuto aspektas iomete kiel gigantega pomo, kies petiolo kaj krono estas la norda kaj la suda polusoj. La ĉefa tasko de tiuj zonoj ŝajnas esti la protekto de la tero kontraŭ la forta, noca sunenergio kaj la terura kosma malvarmego. Sed la zonoj ne protektas la polusojn kontraŭ la kosma malvarmego, kio eksplikas la fortan malvarmegojn sur la polusoj.

(P.J. Doumen)

Sugestoj por eviti streson

(Tips om stress te vermijden)

Ĉiu iam spertas streson. Tiu estas normala afero, kiam tio okazas malofte. Sed ĉiutage sperti streson, ne estas sanige. Tial jen kelkaj konsiloj por forigi streson el via vivo.

Eble ne estas via tasko, sed zorgu, ke via domo kaj laborloko estu propraj kaj ordigitaj. Ordo kaj propreco ripozigas vian kapon.



Uzu agendon kaj planu vian tagon. Ĉiu iam forgesas ion, kiel ajn ni penas eviti tion. Povas temi pri malgrava afero, sed ankaŭ pri grava rendezuo aŭ la dato de via edz(in)iĝo. Agendo helpas vin optimume uzi vian tempon kaj ebligas vin fiksi prioritatojn en via vivo. Tio ŝparigos al vi streson, kaŭzita de forgeso de grava afero, kiun vi devis, sed ne ŝatis fari kaj tial prokrastis. Danke al via agendo vi ankaŭ trovos tempon por via ŝatokupo, kiun vi bezonas kiel rimedon por tute povi malstreĉi vin.

Ĉiuj kredas, ke ferioj helpas liberigi nin de nia streso, sed ofte ferioj kaŭzas pli da streso, ol ili forigas. El esploroj montriĝas, ke, se vi antaŭe bone planas viajn feriojn, tio evitas al vi streson. Nur la planado de la ferioj jam donas al vi pli bonan senton. Kaj se vi koncentriĝas en tio, kion vi volas fari dum la ferioj, vi povas esti certa pri malstreĉaj ferioj.

Muziko povas kaŭzi multaj emociojn kaj eĉ fizikajn reagojn. Trankvila muziko helpas vin malstreĉiĝi kaj estas do tre taŭga por malpliigi streson.

Alia rimedo por plialtigi vian streson vi povas trovi en via nutraĵo. Ni ne ĉiam manĝas sanigajn aferojn, kaj ne ĉiam prenas sufiĉe da tempo por manĝi. Sed se vi deziras malaltigi vian streson, provu mediteranean dieton : legomoj, fruktoj, legumenacoj, fiŝo, ruĝa vino kaj kompreneble ankaŭ oliv-oleo. Sana korpo tre rapide pozitive influas la menson. Vi certe rimarkos, ke, se vi vivas pli sane, vi ankaŭ sentas vin pli bona en via korpo.

Sufiĉe da dormo estas esenca. Ĉiu jam sentis sin malbonhumora post tro mallonga nokta ripozo. La rilato inter dormo kaj streso povas esti pli forta ol tio ĉi. Manko je dormo povas kaŭzi streson, kaj streso siavice povas kaŭzi pli malbonan noktan ripozon. Provu eviti tion, adaptante vian vivostilon, por ke vi ĝuu bonan noktan ripozon. Per tio vi sentos, ke vi havos ĉiam malpli da streso. (*El la revuo 'Tips'*)

La Usona Interna Milito (3)

(De Amerikanske Burgeroorlog)(3)


La du ĉefaj generaloj de la Okcidento tiutempe estis Halleck en Ilinojso kaj Buell en Kentukio. Malfeliĉe ili montris sin same tiel singardaj kaj timemaj kiel MacClellan. Lincoln deziris, ke Teneseo estu okupaciita, ĉar tio rompus la gravan fervojon kiu ligas Virginion kun la misisipa valo, sed Buell ne konsentis pri tio.



Sed feliĉe ambaŭ havis aktivajn subulojn: Grant kaj Thomas. Grant tute ne ripozis : laŭflue trans Misisipo situis la domaro Belmont. En novembro 1861 li enŝipigis 3.000 soldatojn, navigis tien kun du kanonboatoj, venkis la tiean sudan armeon kaj prenis ĝian tendaron.

Kelkajn semajnojn poste generalo Thomas invadis orientan Teneseon, sed Buell revokis

lin: li devis restis en Kentukio. Tio kuraĝigis konfederan armeon invadi Kentukion kaj posteniĝi tie. Federuloj kaj konfederuloj fine koliziis la 17-an de januaro 1862. Thomas venkis la konfederan armeon, kiu retiriĝis en



Teneseon. Ĝi forlasis sian tendaron kun multaj provizoj, 1000 ĉevaloj kaj 11 kanonoj. La vojo al orienta Teneseo estis nun malfermita. Tiam la sudo registaro sendis generalon Beauregard okcidenten kun 15 regimentoj por subteni generalon Albert Johnston, kiu estis retiriĝinta antaŭ Grant.

Kun 15.000 soldatoj Grant tiam kaptis la konfederan fortikaĵon Fort Henry en nord-okcidenta Teneseo. Sub li servis la generaloj Smith, MacClermand and Lew Wallace. Smith estis lia instruisto en West Point kaj servis nun sub sia ekslernanto! Post la milito Lew Wallace akiris mondvastan famon per sia romano "Ben Hur". MacClermand konspiris kun Halleck por forpreni al Grant ties komandon. Sed ili ne sukcesis. Nun Grant sekvis la riveron Teneseo, sekvata de du kanonboatoj, kaj marŝis al Fort Donelson, dum Halleck daŭre sendis al li novajn trupojn. Timigite, Johnston retiriĝis al Nashville apud la rivero Teneseo. La kanonboatoj pripafis la fortikaĵon je distanco de du mejloj. La federa brigada generalo Simon Buckner, la sama kiu antaŭe donis monon al Grant kaj nun komandis la fortikaĵon, igis demandi al Grant, kiujn garantiojn Grant donus al li, se li kapitulacus. Smith konsilis al li doni "neniajn garantiojn al la damnitaj ribeluloj". Grant respondis al Buckner: "Mi postulas tujan kaj senkondiĉan kapitulacon." Buckner kaj liaj 15.000 viroj demetis siajn armiloj. Tio estis la unua granda venko de la norduloj. Kiam la mesaĝo de la venko de Grant atinigis la Nordon, li tuj fariĝis granda heroo.

Kiam Johnston kaj Beauregard aŭdis pri la kapitulaco, ili haste retiriĝis pli suden al Corinth apud Misisipo kun 45.000 viroj. Grant estis nomumita majoro-generalo, kio metis lin super Buell. Sen perdi tempon li kaptis Nashville en februaro 1862. Tie li trovis enorman kvanton da provizoj kaj multajn sakojn kun novaj tendoj. Grant nun havis kvar plenajn diviziojn, entute 30.000 virojn. Nun la avangardo de Buell singarde avancis suden serĉante la konfederulojn.

Generalo William Sherman kondukis novan divizion al Pittsburg Landing, near Shiloh en Teneseo kaj okupaciis ĝin. Grant ordonis Buell enmarŝi Teneseon kaj aliĝis al li kun 30.000 viroj. Tiam Grant marŝis al Corinth kun 45.000 viroj. La suduloj atakis la nordulojn la 6-an de aprilo 1862 apud Shiloh. La norduloj estis puŝitaj malantaŭen al la rivero, kaj ŝajnis malgajni la batalon. Sed la postan matenon Grant, plena je memfido, atakis la sudulojn, kiuj devis retiriĝi je la tagmezo. Grant perdis 13.000 virojn. Intertempe Buell marŝis kun siaj trupoj al Chattanooga en orienta Teneseo.

Ankaŭ de la atlantika bordo venis bonaj novaĵoj al Vaŝingtono. Norda ŝiparo kun armeo konkeris la fortikaĵojn sur la oceanbordo de Virĝinio, kaj tiel ebligis nordan invadon ekde la oceano. En aprilo 1862 la norda admiral Farragut eniris kun sia ŝiparo Misisipon ekde la Meksika Golfo, ŝteliris inter du sudaj fortikaĵoj apud la delto, sinkigis aŭ forpeligis la sudajn kanonboatojn kaj albordiĝis en Nov-Orleano, kiu kore bonvenigis la nordulojn.

En julio 1862 MacClellan estis maldungita kiel ĉefkomandanto, kaj Halleck estis nomumita ĉefkomandanto de la Okcidento.

En Virĝinio MacClellan forpeligis Joe Johnston de la batalkampo de Bull Run, sed neglektis persekuti lin trans la rivero Rappahannock en suda Virĝinio. Anstataŭe li enfosis sin kun 53.000 viroj antaŭ Richmond. Ankaŭ la konfederala armeo enfosis sin.

MacClellan ankoraŭ ĉiam kredis, ke la konfederala linio estis tro forta por esti sturmata. Li preferis atendi MacDowell kun trupoj kaj tial plilongigis unu alon de sia armeo por li. Joe Johnston malkovris tiun malfortan parton kaj atakis ĝin. Du tagojn la du armeoj batalis obstine sed sensukcese kaj perdis po 5.000 virojn. Johnston estis vundita kaj anstataŭigita per la brila generalo Robert Lee.

En tiu momento aperis la fama suda generalo Thomas "Stonewall" Jackson. Kun 15.000 viroj li atakis unu post la alia tri nordajn

armeojn en okcidenta Virĝinio – Frémont, Banks kaj MacDowell – antaŭ ol aliĝi al Robert Lee.

Fine de junio MacClellan havis 105.000 virojn, dum Lee havis nur ĉirkaŭ 60.000. Sed MacClellan ne kuraĝis ataki lin, ĉiam atendante MacDowell, kiu neniam venis.



La suda generalo Thomas « Stonewall » Jackson

Norde de la rivero Chickohominy en Virĝinio troviĝis la V-a Armekorpuso de MacClellan. Lee left 20.000 virojn en la tranĉeoj antaŭ la pozicio de MacClellan kaj sendis la reston de la armeo norden, dum Stonewall Jackson venis de la nordo. Ili venkis la federulojn, kaj tutaj nordaj regimentoj kapitulacis.

Sekve de tio MacClellan, timigite, retiriĝis al Malvern Hills ĉe la rivero James. Posttagmeze de la 1-a de julio Lee denove atakis la nordulojn per 14 brigadoj, sed la armeo de Lee estis venkita. Tamen MacClellan ne profitis de tiu venko por ataki Richmond.

Tiam Vaŝingtono sendis majoron-generalon John Pope al Virĝinio por ekmovi tie la militon kaj donis al li 50.000 virojn, nome la restojn de la armeoj de MacDowell, Banks kaj Frémont. Sed Pope and MacClellan troviĝis tro for unu de la alia por povi kunlabori. Lee sendis Stonewall Jackson por serĉi Pope, dum MacClellan marŝis norden por unuiĝi kun Pope. Antaŭ ol ili povis unuiĝi, Lee sendis Stonewall Jackson al

Manassas por nuligi la provizojn de Pope, kiu atakis lin, kaj tiel Bull Run denove fariĝis batalkampo en la milito. Tiam Lee alvenis kaj sendis generalon James Longstreet kun 30.000 veteranoj por ataki Pope en la flanko. Pope estis venkita kaj fuĝis norden. La trupoj de MacClellan suferis poste la saman sorton.



Sekve de tio komence de septembro la nordaj trupoj retiriĝis al la fortikaĵoj ĉirkaŭ Vaŝingtono, and Virĝinio estis denove en la manoj de la suduloj. Tiam Lee enmarŝis Marilandon kaj haltis ĉe Hagerstown. Malfeliĉe iu suda oficiro perdis kopion de la planoj de Lee, kiun trovis nordulo. La 17-an de septembro MacClellan atakis Lee kun 40.000 viroj apud Antietam. En la tre furioza batalo Lee perdis pli ol 10.000 virojn. MacClellan perdis 2.000 virojn kaj preskaŭ 10.000 vunditojn. Sed Lee ne retiriĝis. Kun armeo de 30.000 viroj li atendis la atakon de MacClellan. Kvankam li gajnis la batalon, MacClellan ne kuraĝis ataki Lee kaj lasis lin foriri. Dum la resto de septembro kaj oktobro li tendumis ĉe la rivero Potomako, reorganizante sian armeon kaj donante al Lee la tempon fari la samon. Ĉe la sekvanta renkonto Lee havis denove 45.000 soldatojn.

(Laŭ libro de Bruce Catton)

Nia rakonto: La Muŝo (2)

(Ons verhaal: De Vlieg) (2)

“La knabinoj ĝojis pri la stato en kiu la tombejo troviĝis,” diris la maljuna voĉo. “Ĝi estas tre bele prizorgata. Tio ne povus esti farata pli bone, se la tombejo troviĝus hejme. Vi neniam estis tie for, ĉu ne?”

“Ne, ne!”

Pro diversaj kialoj la mastro neniam estis tie.

“Tie estas miloj da tomboj,” daŭrigis la maljuna Woodifield kun tremanta voĉo, “kaj ĉio estas tiel bela kiel ĝardeno. Floroj kreskantaj

sur ĉiuj tomboj kaj inter ili belaj larĝaj padoj.” Estis klare per la sono de lia voĉo, ke li ŝatas larĝajn padojn.

Li denove paŭzis. Tiam la maljunulo ekbrilis kvazaŭ per miraklo.

“Ĉu vi scias, kiom la hotelo igis pagi la knabinojn por unu poto da marmelado?” li demandis. “Dek frankojn! Ŝtelo mi nomas tion. Estis nur malgranda poto, diris Gertruda, ne pli granda ol poto de duona krono. Kaj ŝi prenis ne pli ol plenan kuleron, kiam ili alkalkulis al ŝi dek frankojn. Gertruda prenis la poton kun ŝi por instrui al ili lecionon. Ŝi pravis. Tio estas eks-pluatado de niaj sentoj. Ĉar ni estas tie nur por ĉirkaŭrigardi iomete, ili kredas, ke ni pretas pagi al ili ion ajn. Tio estas, kion mi volis diri.” Kaj li turnis sin al la pordo.

“Vi pravas, vi pravas!” ekkriis la mastro, kvankam li ne havis la plej malgrandan ideon, en kio Woodifield pravas. Li ĉirkaŭiris sian skribtablon, sekvis la ŝov-irantajn paŝojn de la maljunulo al la pordo kaj lasis lin eliri. Woodifield iris hejmen.

Longan momenton la mastro staris tie fikse rigardante nenion, dum la grizhara officeja mesaĝisto observis lin, enirante kaj elirante sian ĉambreton, kvazaŭ hundo, kiu atendas esti promenigata de sia mastro.

“La unuan duonan horon mi ricevos nenium, Macey,” tiam diris al li la mastro. “Ĉu vi komprenas? Tute nenium!”

“Tre bone, sinjoro.”

La pordo refermiĝis. Per firmaj, pezaj paŝoj la mastro denove transiris la brilan tapiŝon, lasis sian grasan korpon fali sur sian risortfotelon kaj, klinante sin antaŭen, kovris sian vizaĝon per la manoj. Li deziris, intencis, pretis plori...

Estis terura ŝoko por li, kiam la maljuna Woodifield faris tiun rimarkon pri la tombejo de lia filo. Estis, kvazaŭ la tero estus malfermiĝinta kaj li estus vidinta sian filon kuŝanta tie, dum la knabinoj de Woodifield rigardis lin. Ĉar estis strange. Kvankam ses jaroj jam estis pasintaj, la mastro neniam pensis pri lia filo krom kiel kuŝanta neŝanĝiĝinta, nedifektita en lia uniformo, dormanta por ĉiam.

“Mia filo!” ĝemis la mastro, sed nenia larmo venis.

En la pasinteco, dum la unuaj monatoj kaj eĉ jarojn post la morto de la knabo, li devis nur diri tiujn vortojn kaj tia malĝojo superfortis lin, ke nenio krom forta ekploro povis malpezigi lian koron. Tempo, li tiam diris al ĉiuj, ne kapablos ŝanĝi tion. Aliaj viroj eble povus iam

*Met de hartelijke groeten van
Kun la koraj salutoj de*

KBC-Bank Hechtel

Rode Kruisplein 5
B-3940 Hechtel
Tel. 011-73.02.20
Fax 011-73.02.21
hechtel@kbc.be

post iam mastri sian malĝojon, sed ne li. Kiel tio eblis? Lia knabo estis unika filo. Ekde lia naskiĝo la mastro laboris por pligrandigi sian entreprenon por li. Tio ne havis alian signifon, se ne estis por la knabo. Lia vivo mem ne havis alian signifon. Kiel li estus povinta laboregi, foroferi sin, daŭrigi ĉiujn tiujn jarojn sen la ĉiam ĉeestanta espero, ke la knabo iam paŝos en liaj piedsignoj kaj pluigos la laboron, kie li ĉesos?

Kaj tiu espero estis tiel poksima al sia plenumiteco. La knabo jam estis en la oficejo dum unu jaro antaŭ tiu terura milito, lernante teni la bridojn.

Ĉiumatene ili foriris kune kaj revenis hejmen per la sama trajno. Kaj kiom da gratuloj la mastro ricevis kiel patro de la knabo! Nenio miriga! La knabo bone faris tion, kion li devis fari. Koncerne lian popularecon ĉe la stabo, ĉiu viro, inkluzive de la maljuna Macey, laŭdis la knabon. Kaj li tute ne estis dorlotata! Ne, li simple estis brila kaj natura, dirante la ĝustan vorton al ĉiuj kun lia knabeca rigardo kaj lia kutimo diri: "Simple bonege!" Sed ĉio estis nun for, kvazaŭ tio neniam estus okazinta. Ĉio malaperis la tagon, kiam Macey enmanigis al li la telegramon, kiu neniigis la tutan revon: "Ni profunde bedaŭras informi vin, ke ...". Kaj li forlasis la oficejon kiel kripligita viro, kies vivo estas nura ruino.

Tio okazis antaŭ ses jaroj.. Kiel rapide pasis la tempo ! Tio povis esti okazinta hieraŭ. Li forigis la manojn de sia vizaĝo. Li iel ŝajnis ne esti en ordo. Li ne sentis sin, kiel ĉiam. Li ekstaris por ĵeti rigardon sur la foton de la knabo, sed ne estis lia plej favorata foto. Lia vizaĝesprimo estis nenatura. Ĝi estis malvarma, eĉ severa. La knabo neniam estis tia.

(Katherine Mansfield - daŭrigota)

Aktivaĵoj de la Limburga Esperanto-Asocio

Dum la monatoj majo kaj junio 2012 :

Ĵaŭdon, la 31-an de majo :

Ses esperantistoj kuniĝis en la kutima lokalo de la Poorthuis de Peer por ludi je kartoj. Jan antaŭe klarigis la esperantajn terminojn rilate al ludkartoj kaj la kartludo 'Ĵokero'.

Ĉiuj bone amuziĝis.

La gajnantoj de la vespero estis Henri Schutters kaj An Olijslagers.

Ĵaŭdon, la 21-an de junio :

Sur la programo estis promenado tra naturareo kaj vizito al la fama mezepoka Tomp en Achel, loĝloko de Paul Hotterbeekx, kiu organizis la vesperon. Ĉar Paul devos viziti kun sia edzino malsanulejon en Loveno la 28-an, tiu ĉi aktivaĵo estis ŝovita al ĵaŭdo la 21-a.

Malgraŭ la malbela vetero kvin esperantistoj kunvenis ĉe Paul kun pluvombrelo, ĉar jam pluvis la tutan tagon, kaj oni ne atendis pli-bonigon de la vetero. Ni tamen veturis tra la naturparko ĝis la Tomp. Tiu turo estas rekonstruaĵo de mezepoka ruino, kiun oni antaŭe misinterpretis kiel turon, sed verŝajne estis restaĵo de muelejo, kiu apartenis al la senjoroj de Grevenbroek, kies kastelo staris en la ĉirkaŭaĵo. Ni eniris la turon kaj grimpis ĝis en ĝia pinto. Ni miris pri la tre dikaj muroj – pli ol metron – , kaj la solidaj, dikaj kverkaj traboj.

Tio daŭris unu horon. Post tio ni eniris la muelistan dometon, ĉar ankoraŭ pluvis. Paul, kiu kunportis trinkaĵojn kaj sian gitaron, dum tuta horo kantis konatojn kanzonojn kun esperantaj tekstoj, akompanante sin per sia gitaro. Li vere estas talentica kantisto.

Dum ni atente aŭskultis la belan kantadon, ni trinkis bieron, limonadon aŭ akvon. Je la deka ni ankoraŭ ne deziris iri hejmen, kaj ni ludis je kartoj, ankoraŭ unu horon.

Je la dek-unua ni reveturis hejmen.



*Al ĉiuj gelegantoj de 'La Ponto',
kĵe ajn en la mondo ili loĝas,
la estaro de la LĒA deziras
agrablajn faj malstreĉajn feriojn!*

Enhavo de tiu ĉi numero de ‘La Ponto’:

- Paĝo 2: Kolofono
Redaktore...
- Paĝo 4: Dua Libro de l’ Lingvo Internacia (7) (*D-ro L.L. Zamenhof*)
Novaĵoj el Esperantolando:
- Meksiko: Utopio en 4 movadoj (*Mallely Martínez, Meksiko*)
- Ĉinio: Hajnano, Esperanto-Insulo II (*Henri Masson, Francio*)
- Interreto: Esperanto bezonas tradukistojn (*Henri Masson, France*)
- Paĝo 5: - Svedio: Datumbazo de esperantaj artistoj (*Ret-Info, Eventoj, Hungario*)
- Germanio: Feliĉan naskiĝtagon, Esperanto! (*Ret-Info, Eventoj, Hungario*)
Nia vasta, bunta mondo
- Io pri nia sunsistemo (*Pieter Jan Doumen*)
- Paĝo 6: - Sugestoj por eviti streson (*El la revuo ‘Tips’*)
- Paĝo 7: La Usona Interna Milito (3) (*Laŭ libro de Bruce Catton, Usono*)
- Paĝo 9: Nia rakonto: La Muŝo (2) (*Katherine Mansfield, Anglio*)
- Paĝo 10: Aktivaĵoj de la Limburga Esperanto-Asocio.

Lernu Esperanton!

*Kiom da fojoj ni ne staras en fremda lando kun frostinta lango, ne kapablaj paroli la lingvon de la tieaj homoj?
La mondo bezonas superna-cian, duan lingvon.
Sola Esperanto ofertas vere demokratan solvon por tiu problemo, ĉar per ĝia ekonomia kaj politika neŭtraleco ĝi metas ĉiujn homojn sur egalajn nivelojn.
Ĝi estas ne nur la plej facila lingvo en la mondo kaj la sola, kiu estas tute regula – ĝia grammatiko ne havas esceptojn –, sed ĝi pledas ankaŭ por egalaj rajtoj por ĉiuj popoloj.
“Kiom da lingvoj oni parolas, tiom da fojoj oni estas homo”, diris imperiestro Karlo V.
Tamen homo bezonas, ekster sia dialekto, nur du lingvojn: sian nacian lingvon kaj Esperanton.
Esperanto ne volas anstataŭigi la naciajn lingvojn, kiel pensas multaj homoj, sed jes servi kiel komunikilo inter homoj, kiuj ne havas la saman gepatran lingvon.*

Leer Esperanto!

*Hoe vaak staan wij niet in een vreemd land met de mond vol tanden, niet in staat de taal te spreken van de mensen aldaar?
De wereld heeft een supranationale, tweede taal nodig.
Alleen Esperanto biedt een echt democratische oplossing voor dat probleem, want door zijn economische en politieke neutraliteit plaatst het alle mensen op gelijke voet. Het is niet alleen de eenvoudigste taal ter wereld en de enige die volledig regelmatig is – haar grammatika heeft geen uitzonderingen –, maar zij pleit ook voor gelijke rechten voor alle volkeren.
“Zoveel talen als men spreekt, zo vaak is men mens,” zei keizer Karel V.
Nochtans heeft een mens behalve zijn dialect maar twee talen nodig: zijn nationale taal en Esperanto. Esperanto wil niet de nationale talen vervangen, zoals sommigen denken, maar wel dienen als communicatiemiddel tussen mensen die niet dezelfde moedertaal hebben.*

Apprends l’Espéranto!

*Combien de fois ne restons-nous pas bouche bée dans un pays étranger, incapables de parler la langue des indigènes ? Le monde a besoin d’une langue supranationale. Seul l’Espéranto offre une solution vraiment démocratique à ce problème, car, par sa neutralité économique et politique, il met tous les hommes sur un pied d’égalité. Ce n’est pas que la langue la plus simple au monde et la seule qui soit tout à fait régulière – sa grammaire n’a pas d’exceptions –, mais il plaide aussi pour des droits égaux pour tous les peuples.
"Autant de langues on parle, autant de fois on est homme," a dit l’empereur Charles-Quint. Pourtant un homme n’a besoin, hors de son dialecte, que de deux langues: sa langue nationale et l’Espéranto, qui ne veut pas remplacer les langues nationales, comme pensent certains, mais servir de moyen de communication entre les gens qui n’ont pas la même langue maternelle.*